

Heinrich Heine,  
Lorelay

*tradukita de Hans-  
Georg Kaiser*

Heinrich Heine,  
Lorelej'

*tradukita de Leopold  
Elb*

Heinrich Heine,  
Lorelejo

*tradukita de Joachim  
Gießner*

Heinrich Heine,  
Lorelej

*tradukita de Ludwig  
Lazarus Zamenhof*

*Tiu traduko estas po-  
ste iom modifita de ali-  
uloj, ne estas la origina  
traduk-versio de Leopold  
Elb.*

Min kaptas malgaj' en  
la koro,  
pro kio tia trist'?  
Fabel' el antikva foro  
ne lasas de mi kun per-  
sist'.

Ne scias mi, kial mi  
estas  
Malgaja en la kor'.  
Antikva fabelo restas  
Por ĉiam en mia me-  
mor'.

Malgajon mi sentas en  
koro,  
sed kial tia tim'?  
Legendo el pratempa  
foro  
Vagadas tra mia  
anim'.

Ne scias mi, kial subi-  
ta  
malgaj' en la koro na-  
skiĝis;  
el tempo jam enterigi-  
ta  
legendo al mi revi-  
viĝis.

Aere fridetas, trankvi-  
las,  
malhelas jam la Rejn'.  
La monto surpinte bri-  
las  
vespere en rava scen'.

Vespero jam ekmalhe-  
liĝas,  
Fluadas la Rejn' en  
trankvil',  
La supro de l' monto  
lumiĝas  
En vespersuna bril'.

Jam fluas la Rejn' en  
malhelo,  
kaj malvarmetas l'  
aer'.  
Sed brilas la mont' en  
orbelo  
pro suna lum' de l' ves-  
per'.

Jam malvarmetiĝas l'  
aero,  
la Rejno mallaŭte ba-  
bilas,  
per oro de l'sun' en  
vespero  
la supro de l' monto  
rebrilas.

Tre ĉarma feino sidas,  
jen supre por ador';  
la ora ornamo ridas;  
ŝi kombas harojn el or'.

Belega knabino jen  
tronas  
Kun ora juvelar',  
La belan vizaĝon kro-  
nas  
Mirinde la ora harar'.

Jen supre kabino pro-  
vokas  
per ora juvelar',  
kaj ŝia beleco allogas  
kaj ŝia ora harar'.

Plej belan knabinon  
mi vidas:  
en ora ornamo brilan-  
te,  
sur supro de l' monto  
ŝi sidas,  
la harojn mistere kom-  
bante.

Ŝi kombas per ora  
kombilo  
kaj kantas kun pasi';  
mirigas min la elbrilo  
kaj forto de l' melodi'.

Ŝi uzas kombilon el  
oro  
Kaj dume kantas ŝi.  
Mirige tuŝas al koro  
Sorĉiga la melodi'.

Ŝi kombas ĝin, kantas  
sorĉige,  
sirene kantas ŝi  
per neimagebla, mirige  
potenca melodi'.

La oran kombilon ŝi  
movas  
kaj kantas tra l' pura  
aero,  
kaj forto mirinda sin  
trovas  
en tiu ĉi kant' de  
l'vespero.

...

...

...

...

Ŝipisto ŝipeton gvidas, lin kaptas ve' de ek- zalt'. Li ja la rifojn ne vidas', li vidas nur supren sen halt'.	Kaj sopiregon eksen- tas Ŝipisto dum sia ve- tur'; Rifaron li ne priaten- tas, Al monto rigardas li nur.	Ŝipiston en eta boato Turmentas koremoci'. Ne ĝenas lin rifo- kaskado, rigardas nur supren al ŝi!	Ŝipet' iras sur la rive- ro, ŝipisto ekstremis de l' kanto, kaj blinda por ĉiu danĝero rigardas li al la kan- tanto.
Mi kredas, ke ondoj ti- ras la ŝipon funden de l' Rejn'; kaj tio de l' kant' eliras de Lorelaj-siren'.	Mi kredas, ke dronos finfine Ŝipisto kun sia boat', Kaj tion kaŭzis feine La Loreleja kantad'.	Ĝis tiras kun si al Rejn-fundo la ondoj lin kun boat'. Nun kuŝas li en la pro- fundo pro Loreleja kantad'.	Ha, baldaŭ ŝipisto la bela perdiĝis sub l' akvo- turnado; ĝin Lorelej' faris krue- la, per sia mirinda kanta- do.
...	...	...	...

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de HANS-GEORG KAISER (Cezar, \*1954-05-21).

Arg-2-564 (2005-02-03 19:18:09)

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LEOPOLD ELB (†1912-08.04).

Arg-2-71 (2005-02-03 19:06:30)

La traduko troviĝas sur paĝo 84 de la lernolibro „Post la kurso“ de Wilhelm kaj Hans Wingen, eldonita de Ludwig Pickel en Nurembergo (Nürnberg), Germanio.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de JOACHIM GIESSNER (\*1913-12-23 - †2003-11-25).

Arg-2-1115 (2010-09-15 12:51:51)

Tiu ĉi poem-traduko aperis en la kantokolekto "Mia kantaro I", eldonita de Josef Schiffer (Wilstorffstr. 58, D-78050 Villingen-Schwenningen, Germanio, tel. 0049(0)7721-58991; faks. 0049(0)7721-508891, ret-adreso: [Josef.Schiffer@t-online.de](mailto:Josef.Schiffer@t-online.de)), n-ro 30. Krome ĝi aperis en la informilo "Fervoja Esperantisto" de Germana Ferjojista Esperanto-Asocio, n-ro 3/2010, sur paĝo 3.

Traduko de la Germana poemo "Die Lorelei" de HEINRICH HEINE (\*1797-12-13 - †1856-02-17) en Esperanton de LUDWIG LAZARUS ZAMENHOF (Ludoviko Lazararo Zamenhofo, \*1859-12-15 - †1917-04-14).

Arg-2-565 (2009-10-30 16:15:09)

Tiun ĉi tradukversion mi prenis el retejo <http://www.esperanto.mu.ru/Kolekto/Lorelej.html>.